

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2006 numero 3-a: junio / septembro



Fotis Stefano Keller.

Dum la jubilea ceremonio festanta la kvindekjariĝon de CDELI, la 6-an de majo.

Akompanata de la fama itala pianisto Giuseppe Giusta el Cuneo, Jean-Thierry von Büren, membro de la Konsulta Komitato de CDELI, kantanta erojn de *Winterreise* de Franz Schubert, laŭ la esperantigo *Vintra Vojaĝo* de Mad Mevo aŭ Madeleine Stakian, kies esperanto-arkivon heredis CDELI kaj KCE en 2005.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Poŝtfako 3034,
CDELI, Biblioteko de la Urbo,
CH-2303 La Chaux-de-Fonds

Retpoŝto : claud.gacond@ne.ch

Tel. : ĉe CDELI : 032 967 68 55
hejme: 032 926 52 32

Redaktaj kunlaborantoj:

Rolf Ernst, Nancy Fontannaz,
Stefano Keller, Andreas Künzli,
Richard Schneller

SES informas

Redaktaj datlimoj

2006-4: oktobro:

septembre 15.

2006-4: novembro-decembro:

oktobre 15.

2007-1: januaro-februaro:

decembre 15.

2007-2: marto-aprilo:

febuare 15.

2007-3 : majo-septembro :

aprile 15.

Konsultu la retejon de SES !

www.esperan.to/ses

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto,
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel. :
032 932 18 88.

Retpoŝto : mireille-grosjean@rpn.ch

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, PF
301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.

Retpoŝto: info@esperanto.ch

Stefano Keller, sekretario, CP 6034,
1002 Lausanne. Tel.: 079 612 75 79.

Retpoŝto: stefano.keller@kontakto.info

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Bruno Graf, membro, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59.

Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	



Svisa kalendaro

Septembre

- 4 : Lausanne : LES : Filmo Gerda malaperis.
6 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
6 : Wil : EKW : Kunveno.
15 : Zürich : ESZ : Kunveno.
15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
27 : Basel : ESB : Kunveno pri la ferioj.

OktoBRE

- 2 : Lausanne : LES : Kunveno.
4 : Luzern : LES : ĉe ges-roj Rey.
14-15 : Zürich : ESZ & SES : Orientsvisa Esperanto-Kulturrenkontiĝo.
15 : Zürich : ESZ : Familia migrado.
15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
21 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.
28 : Basel : ESB : Prelego de Hans-Peter Senn.

Novembre

- 4 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
6 : Lausanne : LES : Kunveno.
8 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
8 : Wil : EKW : Raporto pri la UK.
18 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.
23 : Basel : ESB : Invito ĉe Hans-Peter Senn.

Decembre

- 2 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
6 : Luzern : LES : ĉe ges-roj Rey.
6 : Wil : EKW : Fondua vespero.
8 : Zürich : ESZ : Zamenhofa Festo.
15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
17 : Lausanne : LES : Zamenhofa Festo.

Januare 2007

- 3 : Luzern : LES : Konversacia rondo.
20 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.

Februare

- 3 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Kultura seminario.
15 : Redakta datlimo de *SES informas*.
17 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.
17 : Chaux-de-Fonds : CDELI : Didaktika sabato.

Esperanto ĉe Comptoir Suisse Grava foiro en Lausanne Septembre 2006

La granda foiro « Comptoir Suisse » en Lausanne havas en 2006 kiel ĉefan temon « le développement durable – nachhaltige Entwicklung – persista evoluo ».

Dank'al privataj kontaktoj inter la organizantoj kaj nia estrarano Stefano Keller ni povas havi tie standon. Estas tre pozitiva fakto, ĉar esperanto bone kongruas kun la ĉeftemo kaj pro la granda kvanto de vizitantoj de tiu foiro.

En sia kunsido de la 13-a de julio la estraro de SES decidis la partoprenon kun buĝeto de CHF 3'000. Estas nia granda agado en 2006. Tamen privatuloj kaj lokaj grupoj povas subteni tiun ĉi agadon per donaco al la poŝtĉeka konto de SES 17-581908-4 Svisa Esperanto Societo kun mencio « Comptoir suisse en Lausanne ». La estraro elkore antaŭdankas la donacontojn.

Plie ni bezonas kunlaborantojn surloke. Se vi deziras kunlabori, bonvolu telefone kontakti kun Stefano Keller : per 079 612 75 79.

Mireille Grosjean, prezidanto de SES.

-oOo-

Vivo de SES

Ĝenerala Kunveno de SES

La Chaux-de-Fonds, Biblioteko de la Urbo
Sabaton 6-an de majo 2006



Fotis Stefano Keller

Konklude al la asembleo Bruno Graf ricevas skulptaĵon kiel dankon por sia longa kaj efika prezida periodo.

Elpakinte tiun ĉi lingvan medalon li emociigite rigardas al ĝi aŭskultante amikajn kaj laŭdajn vortojn de Mireille Grosjean.

Protokolo

Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo La Chaux-de-Fonds, la 6-an de majo 2006

36 personoj ĉeestas, inter kiuj 29 kun voĉdonrajto (la nombro varias dum la kunveno).

1. Komunikoj de la prezidanto :

La tagordo estas unuanime akceptita.

Senkulpiĝoj: Armin Weidmann el Zuriko, Barbara kaj Stanislaw Pochanke el Wil, Claude Piron el Gland, Wolfram kaj Myrta Fischer el Wolfertswil.

Forpasintoj: Bedaŭrinde tiujn lastajn monatojn pluraj el niaj membroj forlasis nin:

Yvon Grosjean el les Brenets, edzo de nia vicprezidantino Mireille Grosjean;
Jacques Dovat el Renens, edzo de nia honora membro Lucienne Dovat;

Heidi Baur el Zuriko, edzino de nia honora membro Arthur Baur;

Margrit Guldin el Berno;

Respekte al ilia memoro la asembleo duminute staras.

2. Elekto de voĉnombrantoj:

Jean-Thierry von Büren kaj François Randin estas elektitaj.

3. Protokolo de la lastjara kunveno en Zuriko :

Bruno Graf rimarkigas du erarojn:

Inter la forpasintoj oni anstataŭu la erare skribitan nomon: Rudolph Schneller per Rudolph Schneebeli.

En la dua paragrafo de la jarraporto, anstataŭ " ...Benno Frauchiger kaj Laurent Burgbacher atingas la aĝlimon

por plu aktivi... ", oni skribu " ... por ne plu aktivi ".

Kun tiuj du modifoj la lastjara protokolo estas unuanime akceptita.

4. Jarraporto 2005, jarkalkulo, bilanco, raporto de la reviziantoj :

Bruno Graf komentas: Je la punkto 3020 subvencioj, ni trovas subtenojn donitajn de SES al la Laŭzana Esperanto-Societo por organizo de konkurso en klaso de grafikistoj, al la lernejo "Grande Ourse" por la akcepto de kunkorespondanta klaso el Aŭstralio, al la ĝeneva societo la Stelo por stando ĉe la Libra Foiro. Bedaŭrinde ne eblis realigi perkorespondan kurson germanlingvan, ĉar mankas redaktantoj.

En la raporto de la kaskontrolantoj ni vidas rimarkojn pri:

1. Manko de finkalkulo pri agado 2003.
2. La perkorespinda kurso germanlingva estas denove nefarita.

Ekas diskuto pri la perkorespinda kurso germanlingva:

Bruno Graf: ni devus ĝin eldoni, sed eble perkorespinda kurso fariĝas malpli necesa nun, ĉar ekzistas pluraj perretaj kursoj. Kiom da lernantoj lernas per la perkorespinda kurso francilingva?

Nancy Fontannaz rimarkigas, ke kun la perkorespinda kurso, la studanto ricevas la sekvan lecionon, nur kiam li

asimilis lecionon. Ŝi ne konas la ekzaktan nombron de la studentoj, ĉar kelkaj portempe ĉesas sendi taskojn, sed regule alvenas lecionoj korektendaj.

Alain Favre: Eblus fari du versiojn, unu retan kaj unu perkorespondan.

La raportoj estas aprobitaj de 27 voĉoj.

5. Buĝeto 2006 :

Eksterordinara punkto estas la kontribuo al presado de la Svisa Enciklopedio Planlingva de CHF 5.000. SES jam kontribuis pere de CHF 10.000 por la redaktado. CDELI subtenas per CHF 5.000, Claude kaj Andrée Gacond per CHF 5.000, la Urba Biblioteko de la Chaux-de-Fonds per CHF 5.000, André Sandoz-Giroud per CHF 3.000. Ankaŭ alportis sian apogon Mireille Grosjean: CHF 1.000, kaj Bruno Graf: CHF 1.000.

Ni daŭrigas serĉi sponsorojn, ekzemple horloĝajn firmaojn, kiel Rado, Movado kaj Eterna, kies nomo estas en esperanto, kaj kontraŭ sponsorado ni povus proponi senpagan reklamon en SES-informas. Ni estas en bona financa situacio kaj estas miraklo, por asocio kia SES, povi eldonis tiom gravan verkon.

6. Modifo de la statuto :

Artikolo 16-a koncerne la konsiston de la estraro:

Bruno Graf: por la nova estraro, elektota post momento, du homoj prezentas sin kiel prezidantoj. Tio postulas pli da fleksebleco en la statuto de la asocio. Kial SES ne estu regata de du prezidantoj, se la membraro subtenas tion? Certe estos pli malfacile gvidi la asocion tiel, sed la intencoj bonas.

Alain Favre esprimas sian timon pri dukapa estraro. Normale la prezidanto

devas respondeci pri la agado de la estraro, kaj kio okazos, se ambaŭ prezidantoj, post iom da tempo, ne plu unuanimos pri la sorto de la societo kaj kverelos?

Iu demandas, ĉu la civilkodo tion rajtigas?

Mireille Grosjean: estas neniu punkto en la civilkodo pri devigo al nur unu prezidanteco. Ni pretas funkcii tiel kaj reveni al unu prezidanteco, se tio necesas. Tiu maniero funkcii agrablas, ĉar du personoj povas reprezenti la asocion. Mireille Grosjean jam spertas kunprezidantecon en alia asocio kaj kontentas pri tiu situacio.

Dietrich Weidmann subtenas la ideon. Ne estis kandidato por unu sola prezidanto.

Anita Perič-Alther: en Ĝenevo jam estis du prezidantoj, reprezenta prezidanto kaj administra prezidanto.

Bruno Graf: Ni juĝu post 3 jaroj, kiam denove okazos elektoj.

Arlette di Vetta: La estraro mem povas ŝanĝi tiun sistemon, la novproponita statutartikolo ebligas tion.

La nova artikolo estas akceptita de 27 personoj kun 2 sindetenoj.

7. Ekzamena regularo forprenota:

La prezidanto legas la koncernan paragrafon. Mireille Grosjean komentas: Se oni pensas mondscale, Svislando estas malgranda lando. Ne utilas havi nacian ekzamenon paralele al la internaciaj ekzamenoj de ILEI. Ĉiuj membroj povas trapasi ekzamenojn dum Universalaj Kongresoj. ILEI kaj UEA estas en rilato kun la Eŭropa Konsilio por diskuti pri la enhavo de lingvaj ekzamenoj. Ni ne plu ricevis raportojn de KCE ĝis tiam taskigita organizi ekzamenojn por SES. Tiu statutŝanĝo ne havas konsek-

vencojn por KCE, kiu daŭre povas organizi proprajn ekzamenojn. Ni metu nian energion por alia celo. Tamen se estus sufiĉe da kandidatoj SES pretus organizi ekzamenojn, tri membroj (Mireille Grosjean, Claude Gacond kaj Monika Molnar) estas rajtigataj por tio de ILEI. Jean-Thierry von Büren estas kandidato.

Dieter Rooke rimarkigas, ke ankaŭ KCE (tra la Civito) estas en konsultaj rilatoj kun la Eŭropa Konsilio.

La forpreno estas akceptita de 20 homoj kun 1 sindeteno.

8. Elekto de la estraro kaj de la kaskontrolantoj :

Bruno Graf, kiu prezidis la societeton dum 9 jaroj ne reprezentigas, sed restas en la estraro kiel konsilanto. Nicole Margot, kiu dum 15 jaroj estis en la estraro forlasas la postenon kaj estas anstataŭita de la kandidato Stefano Keller. Tiu lasta prezentas sin. Li naskiĝis en Hungario, kie li formiĝis kiel edukisto. En 1980 li instaliĝis en Svislando kaj kunlaboris kun Claude

Gacond pri instruado kaj metodologio. Li vojaĝis en Sri Lanka kaj en Peruo por esperanto, kaj deziras stimuli esperantistan turismon en tiu lasta lando. Li aktivas ankaŭ en CDELI.

La nova estraro: Mireille Grosjean, Dietrich Weidmann Hans-Werner Grossmann, Stefano Keller, Bruno Graf, estas unuanime kaj aplaŭde elektitaj.

Christiane Sixtus-Pot kaj Dieter Rooke estas reelektitaj kiel kaskontrolantoj.

9. Honorigo de membro :

Claude Piron, kiu ne bezonas esti prezentita, estas proponita kiel honora membro.

La propono estas aplaŭde akceptita.

10. Diversaĵoj :

Claude Blanc dezirus fondi asocion por handikapuloj.

La kunveno estas fermita je la 12h.

Protokolis Nicole Margot

Laŭzano, la 10-an de majo 2006

-oOo-

50-jariĝo de CDELI

Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale
Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds

La 6-an de majo 2006 la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds en la svisa Ĵuraso inaŭguris siajn novajn ejojn.

En unu el tiuj ejoj, en la dua etaĝo troviĝas la salono de CDELI, kie Claude Gacond, ekde 50 jaroj ordigas la planlingvajn arkivaĵojn. Granda

parto de tiu materialo estas komprenebla en kaj pri esperanto.

Post bonvenigo la ĉeestantoj partoprenis la ĝeneralan kunvenon de SES.

La asembleo akurate finiĝis kaj tiam la gelernantoj de la lernejo **La Grande Ourse** prezentis teatraĵon kun la titolo

Planlingvoj, vere ĉarmaj skeĉoj en
esperanto skribitaj kaj luditaj de ili.

Konklude ili kantis kun Olivier Tzaut.



Fotis Stefano Keller

La gelernantoj de La Grande Ourse inaŭgure al sia teatra prezento titolita **Planlingvoj**

Aperitivo en la salono de CDELI enkondukis tagmanĝon en apuda tura restoracio.

Posttagmeze Jacques-André Humair, la direktoro de la biblioteko, alparolis la partoprenantojn pri la rolo de CDELI kadre de la tuta biblioteko.

Claude Gacond rakontis, ke estis donaco de sufiĉe granda kvanto da libroj, kiu instigis lin peti ĉe la urba biblioteko lokon por meti ilin, ĉar hejme simple ne eblis.

La tiama direktoro de la biblioteko kaj la urba konsilantaro konsentis

kondiĉe, ke iu regule zorgu pri tiu materialo kaj ankaŭ pri la nov-alvenonta.

Tial Claude Gacond petis la instru-aŭtoritatojn, ke la lundon matene li povu ne labori en la lernejo de la vilaĝo La Sagne, kiel instruisto, por povi help-deĵori en la urba biblioteko. Mirinde estis, ke larĝ-pense la instru-departemento tion akceptis kaj tiel CDELI povis ekstarti. Pro tio ni povis festi nun la 50-jariĝon de CDELI.

Post tiu enkonduko Jean-Thierry von Büren, instruisto de la germana lingvo

ĉe la gimnazio en Neuchâtel, kantis en esperanto erojn el Vintra Vojaĝo (Winterreise) de Franz Schubert akompanata de la koncert-pianisto Giuseppe Giusta, membro de la Nuovo Quartetto Pianistico. La tekstoj estis tradukitaj en esperanton kaj donacitaj al CDELI de Madeleine Stakian-Vuille, konata kiel poetino sub la nomo Mad Mevo.

Vere bela memoraĵa tago kvankam ekstere pluvegis.

Nicole Bérout

Laŭ *Sud-Rejna* Kuriero N° 23, julio 2006, la komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj de Mulhouse-Esperanto.

-oOo-

Tagmanĝo en la turrestoracio Espacité



Fotis Stefano Keller

Claude Gacond rondiranta de tablo al tablo por saluti la manĝantojn.

Pri Mad Mevo kaj pri la aperonta enciklopedio

Dum paŭzo meze de la koncerto, kiun ĉeestis bona centoj da aŭskultantoj, sinjorino Armène Stakian, tradukita esperanten de Mireille Grosjean, emociige prezentis la personecon de sia

patrino Madeleine Stakian naskiĝinta kaj travivinta sian infanecon en La Chaux-de-Fonds. Ŝi komprenigis, kiom gravaj estis en ŝiaj okupoj ne nur esperanto, sed ankaŭ la muziko.

Ambaŭ por Mad Mevo esti rimedoj al interhoma amikeco.

Poste Andreas Künzli, tradukita francen de Mireille Grosjean, raportis pri la aperonta enciklopedio. Lian

prelegeton ni ĉi-sekve publikigas. Ĝi komprenigu la gravecon de la plenumita laboro kaj ankaŭ de la aperonta libro.

Atentema publiko



Fotis Stefano Keller

Alparolo de Andreas Künzli okaze de la jubilea ceremonio de CDELI

Karaj gesamideanoj

La nocio projekto estas vorto, kiun la responsuloj de projekto kutime ne ŝatas. Ĉar la plimulto de la projektoj estas prokrastataj ĝis kiam ili trovas sian finon, la vorto iusence iĝis fi-vorto. Iom simila estas la situacio en la

kazo de nia projekto *Svisa Enciklopedio Planlingva*.

Kun bedaŭro mi unue devas raporti, ke ni ne sukcesis eldoni la libron por la hodiaŭa tago kiel dezirate kaj eĉ anonc-ite. La pozitiva novaĵo estas, ke la laboro nun estas preskaŭ finita. La presprovaĵoj de la presejo ekzistas, kaj

mi plenumas la (iom lacigan) taskon tra legi la tekston por la kvina – kaj plej lasta fojo.

La naskiĝo de tiu enciklopedio, kiu ampleksos pli ol 1100 paĝoj, estis longdaŭra kaj malfacila. La teksto de tiom

multe da paĝoj devas esti zorge redaktata, bone verkita, ĉar finfine temos pri libro kun longdaŭra ekzisto kaj aktual-eco, kaj dua eldono estos tre malverŝajna.

Enkonduke al la koncerto



Fotis Stefano Keller

La direktoro Jacques André Humair diras la gravecon de CDELI por la Biblioteko, Mireille Grosjean frazon post frazo lin interpretas esperantlingve, kaj Claude Gacond observas la publikon.

La ĉefa defio de la redaktado de tia multifaceta kaj heterogena materialo estas bone ordigi kaj maturigi ĝin, tiel ke por la legantoj la teksto estu legebla kaj digestebla. En enciklopedio necesas trovi ankaŭ stilan kompromison inter mallongigoj kaj flua teksto. La fina tra- legado de la enciklopediaj manus-

kriptoj permesas okupiĝi pri detaletoj, fajnigi la stilon, trovi pli taŭgajn esprimojn, eviti erarojn, forigi dubojn. Tio estas ege temporaba laboro kaj neeviteble longigas la projekton. Sed tiu klopodo indas. La ripeta kontrolado de la tekstoj ne estas (alemana) pedanteco, sed nepra neceso. Mi ĉiam diris, ke mi

publikigos la tekston nur kiam mi sentos, ke ĝi estas matura. Necesas averti, ke tia ampleksa verko neniam povos (kaj ankaŭ ne celos) esti perfekta. Recenzantoj kaj kritikistoj estos bonvenaj!

Tian dikegan verkon eblis kompili nur dank'al la riĉa materialo, kiu estis kolektata de CDELI dum la lastaj 50 jaroj. CDELI estas la frukto de konstanta laboro de fervoraj kaj kompetentaj arkivistoj, kiuj konscias pri la unikeco de la planlingva realeco. La signifon de tiu unika planlingva arkivo oni ne povas sufiĉe alte pritaksi kaj estimi. La ekspluato de la materialo por la enciklopedio, kiun mi kolektadis dum multaj jaroj, estas impresega.

Kvankam la esperanta parto de la enciklopedio dominas, necesas ankaŭ atenti la partojn pri Volapük, Ido, Occidental-Interlingue kaj Interlingua, la ĉefaj neŭtralaj universalaj lingvoj, kiuj estis praktikataj en Svislando. Dum tiuj lingvoj praktike malaperis, restis Esperanto, kiu venkis en la lukto por la plej supera neŭtrala universala lingvo aŭ internacia planlingvo.

La enciklopedio ne estas nur konsultlibro, kiu prezentas biografiojn de planlingvaj aktivuloj kaj kiu traktas interlingvistikajn temojn. La enciklopedio entenas ankaŭ vastan Antologion kun fundamentaj tekstoj el la kontraŭdira diskutado pri senco kaj esenco de neŭtralaj universalaj lingvoj. Kelkaj tekstoj estos unuafoje publikigitaj. Sed ankaŭ la enkondukaj fak-tekstoj en la germana, franca, itala kaj angla lingvoj, kiujn oni trovos en la enciklopedio, instigu la legontojn enprofundiĝi en la planlingvistikon. Unuafoje estos prezentita ankaŭ ampleksa bibliografio pri planlingvaj verkoj en Svislando.

La libro aperas do, kun prokrasto, okaze de la 100-jara jubileo de Svisa Esperanto-Societo (SES), kiu estis jam festata, kaj ĝustatempe kadre de la 50-jariĝo de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en La Chaux-de-Fonds. Ambaŭ organizoj funkcias kiel eldonantoj de ĉi-tiu enciklopedio.

Mi kaptas la okazon por sincere danki al la sekvantaj personoj, kiuj akompanis kaj subtenis la projekton: Claude Gacond, arkivisto de CDELI, Bruno Graf, prezidinto de Svisa Esperanto-Societo, kaj al Jacques-André Humair, direktoro de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds, en kies sino troviĝas CDELI. En la urbo Neuchâtel povis esti trovita kaj engaĝita la ideala presisto, H. Messeiller SA, kies direktoro Raphaël Gambarini afable akceptis la mendon presi la enciklopedion laŭ finance tolereblaj kondiĉoj kaj kvazaŭ laŭ ĉiuj niaj iom kapricaj deziroj.

Je la fino mi ŝatus aldoni du praktikajn konsilojn: unue mi daŭre invitas al mendado de la enciklopedio, ĉar la subskripcia periodo estas longigita ĝis la fino de majo. La subskripcia prezo de la enciklopedio estas fr. 75.- (aŭ € 50.-), poste la normala vendo-prezo estos fr. 90.- (aŭ € 60.-). Membroj de SES ĝuos aldonan rabaton de fr. 20.- Nepre profitu la unikan ŝancon akiri tiun enciklopedion, ĉar ĝia eldonkvanto estas limigita. Unu centon da mendoj ni jam rikoltis. La dua konsilo direktiĝas al la mendintoj kaj legontoj: En la enciklopedio vi renkontos tutan sistemon de mallongigoj. Antaŭ la uzado de la enciklopedio nepre studu unue la liston de la mallongigoj, kaj vi vidos ke vi jam pli facile elturniĝos. Kaj kiam vi estos

trovinta vian propran foton, vi povos daŭrigi la legadon !

Nun mi esperas, ke la enciklopedio fariĝos grava referenca verko kun daŭraj utilo kaj valoro. Por la esperantistoj gravas kaj necesas, ke ili konatiĝu ne nur kun sia propra historio,

sed ankaŭ kun la trajtoj de la iam konkurencaj planlingvaj sistemoj, kiuj hodiaŭ povas esti konsiderataj ‘sendanĝeraj’.

Dankon.

Andreas Künzli

Forlaso de la aŭlo por la aperitivo en la CDELI-salono



Fotis Stefano Keller

Estrarkunsido de Svisa Esperanto-Societo 13-a de julio Komuniko

La nova estraro de SES, elektita dum la Ĝenerala Kunveno maje, okazigis sian unuan kunsidon je la 13-a de julio

2006. Tiu kunsido signifis inaŭguron de epoko kun pli da renkontoj de la estraranoj, kio permesos efike planadi

kaj realigi la vigligon de la svisa esperanta movado.

La estraro substrekas la gravecon de regula informado ene de nia movado pri aktivecoj, kaj la neceson de kunlaboro inter aktivuloj, lokaj grupoj kaj kluboj.

Por ebligi pli facilan kaj malpli koston distribuon de nia bulteno *SES informas*, ekde la venonta numero (2006-4), SES deziras disponigi ĝian retan version al tiuj siaj membroj, kiuj tion petas.

La aktualigo kaj pliriĉigo de la retaj paĝoj de SES estis pritrakitaj kaj ilia baldaŭa renovigo estis decidita dum la kunsido.

Laŭ la modelo de regula informado en Romandio, Germanio prilaboros sian reton de kontaktendaj ĵurnalistoj, politikistoj, universitatoj kaj aliaj gravaj publikaj instancoj.

Signifa evento de la jaro Svislande estos nia partopreno en la tutlanda foiro « Comptoir Suisse 2006 ». La temo de la ĉijara ekspozicio estas « Persista evoluo – Belas la vivo ». La foiro okazos inter la 15a kaj 24a de septembro 2006 en Lausanne. La estraro alvokas ĉiun bonvolulon kunlabori en tiu grava projekto kaj atendas la sinproponon de helpemuloj por la pretigo de nia ekspozicio, sed ĉefe por deĵorado ĉe nia budo.

Datoj de venontaj estrarkunsidoj estis fiksitaj kaj ni decidis pri okazigo de gazetara konferenco dum unu el ili.

Por kontakti la estraron de SES, bonvolu sendi retmesaĝon al ses@esperanto.ch aŭ kontaktu nin skribe, telefone laŭ la ebloj indikitaj sur la 2a paĝo.

Stefano Keller, sekretario de SES

-oOo-

Donacoj ricevitaj

Donacoj en frankoj al SES: Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen : 5 ; Anonimulo : 25 ; Anonimulo por la enciklopedio : 1000 ; S. Bieri, Neuchâtel : 40 ; Pierette Blanchet, Lausanne : 15 ; Tazio & Teresita Carlevaro, Bellinzona : 100 ; Pierre Dorthe, Lausanne : 30 ; Erna Döring, Basel : 35 ; Richard Ducret, Yverdon les Bains : 15 ; Daniel Elmiger, Neuchâtel : 100 ; Verena Elsner-Bürki, Zürich : 85 ; Monique Fiaux, Chamblon : 15 ; Nancy Fontannaz, Pully : 70 ; Georgette Friedly, Bernex : 15 ; Ernst Glättli, Brugg : 15 ; Renate Herr, Bern : 15 ; Noël Huguenin, La Chaux-de-Fonds : 40 ; Marguerite Jaccard-Besson, Rolle : 30 ; Marguerite Jayet, Morges : 15 ; Jeanne Mamin, La Tour-de-Peilz : 30 ; Peter Menzi, Oberengstringen : 15 ; Jimmy Rivière, Prilly : 15 ; Christiane Sixtus Pot, Genève : 45 ; Marc Vigny, Petit-Lancy : 25 ; Marguerite Viredaz, Lasanne : 20 ; Henri Wettstein, Versoix : 15. **Sume: 2170.**

Nome de SES la kasisto Hans-Werner Grossmann dankas al la registritaj donacintoj pro ties malavareco.

Novaj patronoj 2006 : Traugott Rinaldo Aebi, Ittigen ; Louise Bachmann, Emmen ; Marguerite Jaccard-Besson, Rolle ; Eduard Muster, Ecublens ; Claire & Bernard Nicolet, Commugny ; Henri Wettstein, Versoix.

-oOo-

Orientsvisa Esperanto-Kulturrenkontiĝo

14 kaj 15-ajn de oktobro

Zürich

Organizita de Esperanto-Societo Zürich kaj Svisa Esperanto-Societo
(bonvolu aliĝi sub kursoj@esperanto.ch aŭ telefone 044 251 50 25)

Sabaton, la 14-an de oktobro

Ekde 09h30 ĝis 21h30

Gemeinschaftszentrum Hottingen

Hottingersaal, Gemeindestrasse 54, Zürich

Por alveni el la ĉefa stacidomo de Zürich:
trafu la tramon numero 3 direkto Klusplatz ĝis la haltejo Hottingenplatz

Programo

10.00 – 10.15:	Alveno
10.15 – 11.15:	Filmo “Gerda malaperis” de Claude Piron
11.15 – 11.30:	Paŭzo kun vendado de kafo, kuko, trinkaĵoj
11.30 – 12.30 :	Prelego de Renato Corseti, prezidanto de UEA
12.30 - 14.00 :	Tagmanĝo
14.00 – 14.30	Andreas Künzli prezentas sian Enciklopedion
14.30 – 15.00 :	kafumado, aĉetado de CD, libroj, k.t.p
15.00 – 17.30 :	Distra programo
18.00 - 19.30 :	Vespermanĝo
20.00 :	Adiaŭ

Dimanĉon, la 15-an de oktobro

Familia migrado sur la monto Pfannenstil


Ekde la 9h00 ĝis la 16h00

(bonvolu aliĝi sub kursoj@esperanto.ch aŭ telefone 044 251 50 25)

renkontiĝpunkto: Stacidomo Zürich Stadelhofen

Por alveni el la ĉefa stacidomo de Zürich:
ĉiudumminute veturas trajno al Stadelhofen

La aliĝintoj ricevos la detalan informilon



Kongresen

Svisa vintra semajnfino de JES

Raportas Luko Allemand



Fotis Luko Allemand.

Vespermanĝo en la ĉaledo kaj la neĝ-domo

Saluton !

Inter la 3-a kaj la 5-a de marto mi partoprenis la svisan vintran semajnfiron de *JES*, kiu okazis en St-Anton Oberegg (AI).

Vendrede, je la 10-a horo matene, mi eliris el Ĉaŭdefono per trajno. Kiam mi alvenis en St-Gallen, mi tuj renkontiĝis kun Benno kaj Martina. Post du horoj busaj kaj aŭtomobilaj ni alvenis sur

monto ĉe restoracio. Estis forta vento kaj belega pejzaĝo. Ekde tie oni povas vidi la lagon de Konstanco. Ni iris serĉi la ŝlosilon de nia ĉaledo, lasis la aŭtomobilon tie kaj komencis marŝi en la neĝo.

Sed neniu sciis ekzakte, kie situas la ĉaledo. Post kelkaj minutoj ni vidis domon. Ĉu estas ĉi tie ? Sed tuj poste aperis alia domo, kaj ankoraŭ alia. Benno alproksimiĝis al malnova dezerta domo por vidi, ĉu estas tie. Sed ne ! Ni daŭre iris tra la neĝa kampo, sen vojo. Estis iom malfacile, sed amuze.

Finfine ni alvenis al nia ĉaledo. Malvarma grandega ĉaledo. Tro granda por ni. Post vizito ni iris aĉeti kelkajn manĝaĵojn en la vilaĝo. Ni trovis pli facilan vojon, kiun ni ĉiam uzis poste.

Kim, Laurent kaj lia edzino kun ilia bebo, knabino nomiĝanta Léa, alvenis nur je la 10-a vespere. Ĉiu lacis, do post la manĝo ni rapide enlitiĝis, ĉiuj en la sola varma ĉambro.

Sabate matene ni marŝis tra la kampoj ĝis ie, kie ni decidis konstrui neĝdomon. Ni amasigis multe da neĝo kaj fosis lokon sub la amaso. Tiel eblis por tri personoj sidi en la neĝdomo.

Kiam ni finfine malsatis, ni reiris al la ĉaledo kaj manĝis bonan supon preparita de Laurent kaj lia edzino.

Fine de la posttagmezo mi reiris al la neĝdomo. Mi instaligis sole ene kaj legis mian libron ĝis ne plu sufiĉe lumis.

Dimanĉe, la lastan tagon, estis longa vojaĝo tago por mi. Mi sciis, ke estos buso je la 12-a kaj kvarono kaj ke mi devos alveni al Ĉaŭdefono je la 17-a horo. Do mi pretiĝis por eliri la ĉaledon 10 minutojn antaŭ la 12-a. Laŭ nia

eksperimento de la antaŭaj tagoj, tiu tempo devus sufiĉi.

Sed kiam mi malfermis la pordon, mi havis grandan surprizon : Neĝegis dum la nokto, tiom ke mi devis marŝi kun neĝo ĝis pli alte ol la genuoj, kelkfoje ĝis la talio. Tio evidente malrapidigis min. Kiam mi finfine atingis la vojon, mia buso jam pasis de longe, do mi komencis malgrimpi piede esperante alveni sufiĉe frue la proksiman vilaĝon por trafi la bonan duan buson.

Kurante mi perdis mian dormosakon. Mi haltis, starigis miajn skiojn en la borda neĝo, refiksis la dormosakon kaj rekomencis marŝi. Nur 10 minutojn poste aperis al mi manko. Malesperantigita, mi regrimpis por serĉi miajn forgesitajn skiojn.

Ideo revenigis esperon : mi decidis haltigi aŭtomobilon, eĉ se mi ankoraŭ neniam faris tion. Afabla homo haltis kaj veturigis min ĝis du vilaĝoj poste. Sed tamen mia buso estis foririnta antaŭ 5 minutoj. La sekva alvenis en St-Gallen 5 minutojn post la foriro de mia trajno.

Alvenante al Winterthur oni anoncis, ke arbo estis falinta sur la fervojon. Do mi devis trafi alian trajnon ĝis Zuriko, kiu ankaŭ malfruis. Post unu plia horo de atendo, mi grimpis en la sekvan trajnon. Ĉi-lasto ankaŭ malfruis ! En Biel mi trafis mian lastan trajnon nur duon-horon post kio mi esperis.

Finfine mi alvenis en mian urbon je la 8-a vespere kun 3 horoj de malfruo. Tamen tiu vintra semajnfino estas belega memoraĵo.

La morgaŭon mi legis en la gazeto, ke fervojvojaĝantoj havis 24 horojn de malfruo pro la neĝo tiun dimanĉon.

Luko Allemand

-oOo-

Pri la 91-a U.K.

Kongresaj impresoj

Universalaj kongresoj estas monstroj. Pli ol du mil personoj pilgrimis al Florenco, kie okazis la 91-a Universala Kongreso de Esperanto 29 julio - 5 aŭgusto 2006. Inter ili troviĝis 35 svisoj. Pro la multeco de la temoj eblas raporti nur pri parto de la okazaĵoj. Jen kelkaj personaj impresoj.

Impona estas ĉiam la **malfermo** kun la inaŭguraj prezentoj kaj paroladoj. Je nia surprizo profesoro François Grin el Ĝenevo legis longan tekston en perfekta esperanto, sed multe tro rapide por miaj oreloj. Kiel ne-esperantisto, sed lingvisto, li komentis sian raporton pri la kostoj de fremdlingva instruado. Sen pledi por esperanto, li uzis ĝin en modelo kiel simuladon de neŭtra situacio. Grin rekomendis, ke ni priatentu zorge la manieron prezenti nian lingvon kaj ties valorojn al la publiko.

Dum la Interkona Vespero okazis unuafoje **Movada Foiro**, kie mi prezentis la ĵus aperontan enciklopedion kun la titolo *Universalaj Lingvoj en Svislando*. Landaj kaj fakaj asocioj havis tableton por montri kaj atentigi pri interesaj aferoj aŭ aranĝoj. Apude Germana Esperanto-Asocio varbis por la tradicia *Printempa Internacia Semajno* (PSI).

Denove tre varia kaj instruiga estis la **Kleriga Lundo**. Mi ĉeestis tri seminariojn: Kiel Utiligi Amas-komunikilojn, La Arto Paroli Publike, Veterani Sed Ne Maljuni. Vere esperanta agado tre taŭgas por resti aktiva. La veteranoj sugestis, ke UEA starigu konsilantaron de eksaj estrar-

anoj, kiuj povus pludoni spertojn al novaj funkciuloj.

Kiel kutime marde okazis la **Tago de la Lernejo**, tre bone planita de la estro de ILEI, Radojica Petrovic. Oni povis aŭdi 15 koncizajn raportojn pri la instruado de esperanto en Italio, Eŭropo kaj tutmonde. Ekzemple Angela Tellier informis pri la projekto Springboard en Britio, kiu proponas instrui esperanton en elementaj lernejoj por faciligi la lernadon de fremdaj lingvoj.

La **Eŭropa Esperanto-Unio** okazigis plurajn kunvenojn sub la prezido de Sean O Riain, irlanda diplomato en Bruselo. Zlatko Tisljar, sekretario, fojon plu pretendis, ke Eŭropo bezonas identigan lingvon kiel esperanton, sed li rikoltis kontraŭdiron. Iu aludis al Svislando por pruvi, ke ne necesas komuna lingvo por vekti nacian senton. SES estas membro de EEU kiel observanto. EEU planas krei DVD-filmon *Kio povus esti Eŭropo*, kiu montros la Esperanto-movadon kaj ties kulturon. Tiu filmo estas sendota al eŭropaj parlamentanoj. EEU invitas al kongreso en Maribor (Slovenio) 28 julio - 4 aŭgusto 2007, kiu servu ankaŭ por politikaj iniciatoj.

Inter la **Artaj Aranĝoj** elstaris la pianokonzertoj de Andrej Korobejnikov el Moskvo. Kiel „mirakla infano“ kaj talenta pianisto li jam gajnis multajn konkursojn, akiris mirindan majstrecon kiel virtuozo kaj temperamenta interpretisto. Ni esperas reaŭdi lin dum venontaj kongresoj.

Malpli plaĉa estis la Nacia Vespero. La organizantoj petis pri indulgo pro la malbona akustiko en la vastega salono. Kantis dum la vespero nur Montara Koruso „La Trodotta“, kio ne sufiĉis por riĉa programo. Tio estis laŭ mi la malforta punkto de la kongreso, sed la fortaj ja ege kompensis.

Ne antaŭviditaj estis du dueloj de eminentuloj dum la eroj „Akademio publika“ kaj „La Estraro respondas“. Dum diskuto pri la lingvouzo Corsetti defendis la zamenhofan esperanton, sed kontraŭdiris Tonkin, ke la lingvo daŭre ŝanĝiĝas. La publiko aplaudis ambaŭ. Alian tiklan demandon faris Enderby, kiu volis scii, kiaj estas la rilatoj inter UEA kaj la Civito. Corsetti ne respondis, sed klarigis principon. Li opinias, ke la koncepto de la Civito estas falsa, ĉar ĝi volas krei apartan mondeton dum UEA volas plibonigi la mondon, punkto.

Pluraj svisoj aktive kunlaboris en la kongreso. Mireille Grosjean partoprenis la komitatajn kunsidojn nome de SES, kunreĝisoris la Artan Vesperon, helpis en la organizado de ekzamenoj. Andy Künzli faris tri interesajn prelegojn, pri kiuj vi povos legi aliloke. Jean-Thierry von Büren kantis sur la podio la himnon dum la malfermo kaj la fermo. Kaj post la fermo la svisoj kuniĝis kaj decidis kune vespermanĝi. Tiel okazis.

Mi ne raportis pri la kongresa temo „Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo“, la strategia forumo, prelegoj pri Italio, la esperantologia konferenco, la kongresa universitato, la kongresa rezolucio kaj pri multaj aliaj menciindaj programeroj. Sed eble aliaj

kongresanoj raportos kaj finfine vi legos pri la UK en la revuo *Esperanto*.

Bruno Graf

Kongresa Rezolucio

La 91-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Florenco (Italujo) kun 2206 partoprenantoj el 62 landoj, konstantinte,

ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005-2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo, kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla,

ke nuntempe ekzistas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kultura kaj lingva diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio,

ke la nuna superrego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn, kaj edukajn efikojn koncerne daŭropovecon, lingvan ekologion kaj la rajton je komunikado,

ke la strebado de la esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn, kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evoluprocedon responde kaj solidare,

alvokas la esperanto-komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj, kiuj, sur diversaj niveloj, strebas antaŭenigi praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata sanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj,

rekomendas al la estraro de UEA doni al la ĉi-rilataj problemoj pli da atento en estontaj kongresoj kaj agadoj, partnere kun neesperantistaj organizaĵoj,

konfirmas la pretecon de la esperanto-komunumo kunlabori kun Unesko kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo.

-oOo-

Trieste invitis

Post la UK mi veturis al Trieste por partopreni en la 1-a Internacia Somera Renkontiĝo 6 – 12 aŭgusto 2006. La kontrasto estis okulfrapa, de amasa kongreso al familia rondo. Ambaŭ havas siajn kvalitojn kaj logojn.

Kadre de sia centjariĝo Triesta Esperanto-Asocio organizis tiun renkontiĝon sub la titolo **Inter Karsto kaj Maro**. Jam la unua eldono perfektas, nur la vetero koboldis. Partoprenis kelkaj eksterlandaj esperantistoj kaj multaj lokaj.

La triestanoj fieras pri la urbo kaj mi nun bone komprenas la motivojn. Inter karsto kaj maro kuŝas moderna urbo kun mirindaj palacoj, longa strando, internacia haveno. Ekscitis min nur la motorciklistoj, kiuj trakuris la stratojn kiel banditoj, sed same estis en Florenco.

Oni avertis kunporti bonajn ŝuojn. Prave, la migrado en la valo Rosandra postulis tion, ĉar la ŝtona pado glitis. Post streĉa marŝado ankoraŭ viziti gigantan groton, estis elĉerpige. La organizantoj sukcesis lacigi la gastojn tiel, ke ili bone dormis malgraŭ strata bruoj pro aŭtoj.

Naĝado kaj sunumado ĉe la maro estis antaŭvidita dufoje, sed okazis nur unufoje pro ŝanĝema vetero. La triestanoj preskaŭ malesperiĝis, ke ne eblis promeni sur la fama pado de Rilke pro pluvo. Tamen tio ne povis forpeli la gajecon de la grupo.

Ni ekskursis dufoje per ŝipo. Al Duino por la vespera spektaklo „La najtingala fortikaĵo“, kiu kreis misteran etoson pro la lumigitaj rokoj kaj kastelo, kaj la sorĉaj voĉoj kaj muziko. Kiam ni revenis tagojn poste dumtage ni povis solvi la enigmojn de la historio. La dua ŝipekskurso kondukis al la urbeto Muggia, vidalvide de Trieste.

Vole-nevole ni vizitis sub la firma gvido de Elda kaj Edvige ĉiujn interesajn lokojn kaj preĝejojn de la urbo, eĉ la defian ekspozicion pri Andy Warhol. Kaj ne laste ni gastis en la domo de Anita Altherr super Trieste. Plej impresis min la Placo de la Unuiĝo kun la registaraj domegoj, la kastelo de Miramar kaj la koreco de la gastigantoj. Mi deklaris la renkontiĝon plene sukcesinta.

Bruno Graf

Pri ILEI kunveno en Parma

Laŭ artikolo aperinta en Gazeto de Parma la 12-an de aŭgusto

La ILEI - delegacio estis akceptita de skabeno Lavagetto en la urbodoma palaco

Al la delegacio de ILEI diris sian bonvenon en perfekta esperanto skabeno Giampaolo Lavagetto. Li akcepti hieraŭ matene en la urbodomo, per vere duka sinjoreco, la delegacion

de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kies membroj estas enlandaj kaj fremdlandaj kleruloj, inter kiuj Frato Piero Spagnolini de la Instituto La Salle de Parma.

La membroj de ILEI partoprenis kvartagan kunvenon, kiu okazis ĉijare en Parma dum la pasintaj tagoj. Ĝia celo estis la relanĉo de la "lingvo de la paco". Tiel, fakte, estis difinita esperanto. Luigia Madella, "animo" de la Parma Esperanto-Asocio, kaptis la okazon, ne nur por danki al Lavagetto pro "lia simpatio montrita rilate al esperanto kaj al la subteno, kiun li donis al la internacia kultura rendevuo", sed ankaŭ por informi lin pri la farita laboro.

Je demando, ĉu esperanto povos havi estontecon, Madella respondis pozitive montrante grandan optimismon: "ne nur pro la fakto, ke necesas supernacia lingvo parolata de ĉiuj gentoj, sed ankaŭ pro la rezultoj de la tre konstrua

debato por la relanĉo de esperanto, kiun startigis la kunveno".

La vicprezidantino de ILEI, Zsafia Korody, atentigis krome, ke en Germanio ekzistas "Urbo de Esperanto": Herzberg am Harz.

Lavagetto, montrante sian estimon por la laboro farita dum la esperanto-kunveno, aŭspiciis, ke en nia urbo Parma povu esti starigota iu pilota projekto en la bazlernejoj. Simila projekto, rimarkis membro de ILEI, "povus esti financita kaj subtenata de la Eŭropa Komisiono".

Je la fino de la kora renkontiĝo, Lavagetto omaĝis al la delegacio per flageto de la urbodomo kaj insigno de la urbo Parma.

-oOo-

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la
Lingvo Internacia

Biblioteko de la Urbo, Progrès 33
CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 55.

Retadresoĵ :

claude.gacond@ne.ch
martine.schneller@ne.ch
nancy.fontannaz@ne.ch
monika.molnar@ne.ch

Venontaj stud-aranĝoj !

Didaktika stud-sabato okazas principe la trian sabaton de la monato en neferia periodo helpe al ĉiuj esperanto-lernantoj : tutkomencantoj, komenc-

antoj kaj progresantoj. Rezervu la sekvajn sabatojn : **oktobre 21, novembre 18, 2007 januare 20, februare 17, marte 17, junio 16.**

Kultura sabata seminario okazas principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo. Rezervu la sekvajn sabatojn : **novembre 4, decembre 2, 2007 februare 3, marte 3, majo 5, junio 2.** La celo de tiu seminario, kiu disvolviĝas sub la aŭspicio de SES, ILEI kaj UEA, ne estas la studo mem de la lingvo, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Partoprenintoj al 15 tiaj sabatoj estos rekompencitaj per ricevo de atestilo.

Venontaj studtemoj : La unua-libro de 1887, ties planlingva argumentado,

prilingva enhavo kaj originalaj beletraj tekstoj. Komparo inter la lingvo de 1887 kaj la hodiaŭa. Decidigaj influoj de la unua revuo *La Esperantisto*, de Louis de Beaufront, de Kabe.

Horaro de ambaŭ aranĝoj

10 h 00: Malfermo, eblo aĉeti librojn, babili kaj kafumi.

10 h 45: **Oficiala malfermo**, formiĝo de la stud-rondoj. 11 h 00: **Studo**. 11 h 45: paŭzo.

12 h 00: **Studo**. 12 h 45: Tagmanĝo.

14 h 15: **Studo**.

15 h 00: paŭzo. 15 h 15: **Studo**. 16 h 00:

Konkludo. 16 h 15: Teumo, librovendo.

17 h 00: **Oficiala fermo**.

Aliĝo: Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj **ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon almenaŭ ĝis la tago antaŭ la koncerna aranĝo je la 11h00** ĉu skribe: Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: claude.gacond@ne.ch,

ĉu telefone: CDELI: 032 967 68 55.

Partoprenkotizo: Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.-

por partopreno en la stud-sabato kaj po Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario. (Lerneĵano, studento, metilernanto kaj JES-ano senpage). Kiu ne antaŭanoncis sian partoprenon ĝis 11h00 la antaŭan tagon, tiu pagas pluse Fr 5.-.

-oOo-

KCE

Kultura Centro Esperantista

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311

2301 La Chaux-de-Fonds


Tel. & Fakso: 032 926 74 07

kce@esperantio.net

La Somera Universitato pri Mondfederismo, kiu okazis de la 23-a ĝis la 28-a de julio vekis la intereson de la publiko dank'al trafa artikolo de *L'Impartial* aperinta la 25-an de julio.

Informojn pri la venontaj aranĝoj oni trovas en *Heroldo de Esperanto*.

-oOo-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

Tel.: 0049 76 214 57 12.

Kunvenoj: 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Kunvenoj

Septembre: Ni rakontas pri la ferioj.

Oktobre 28: Hans-Peter Senn prelegos pri « Agave-regiono » en Portugalio.

Novembre 23: Invito ĉe Hans-Peter Senn. Programo 2007.

Decembre: Zamenhofa festo.

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20.

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45.

Monata kunveno la unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) 20h00 en la stacidomo de Cornavin, kajo 1, Salono 2.

Kunveno

Septembre 5 : Pri hilelismo kaj homaranismo kun Joĉjo.

Raporto

La 2-an de majo Laurent Burgbacher prelegis pri Novzelando per projekci-aparato bild-film-sona. Kun sia edzino per luita ruldomo dum unu monato li migradis en tiu lando, kie regas neordinara naturo : neĝaj montopintoj, akvofaloj, glaĉeroj, strangformaj rokoj, basenoj kun bolanta akvo., faŭno kaj flaŭro riĉaj kaj variaj, festivalo de balenoj, de fokoj. Entute ĉiuj stelanoj ĝuis pri tiu prezento de eksterordinaraj bildoj kun komentado simpla en klara esperanto.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

CP 246, 1000 Lausanne 22.

Tel: 021 657 14 56

esperanto@isuisse.com

<<http://www.esperanto.ch/Lausanne>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

Kunvenoj

Septembre 4 : Projekcio de la filmo Gerda malaperis de Claude Piron.

Oktobre 2 : Kunveno.

Novembre 06 : Kunveno.

Decembre 17 : Zamenhofa Festo.

-oOo-

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke.

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj: Hotelo Waldstätterhof: Zentralstr. 4 (proksime de la stacidomo). Tel. 041 227 12 71. Restoracio Emmenbaum: Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke. Ĉe Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel.: 041 210 25 88.

Venontaj kunvenoj

Septembre 6 : Konversacia rondo kun Paul Scherer en Waldstätterhof 14h00-16h00.

Oktobre 4 : ĉe ges-roj Rey: 14h00 : Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30: Rakontoj pri travivaĵoj en kaj ĉirkaŭ la UK en Florence.

Novembre 8 : Konversacia rondo kun Sonja Brun en Waldstätterhof 14h00-16h00.

Decembre 6 : ĉe ges-roj Rey: 14h00 : Paroliga leciono kun Paul Scherer, 14h30. Zamenhofologio kaj programo 2007.

2007 Januare 3 : Konversacia rondo kun Paul Scherer en Waldstätterhof 14h00-16h00.

Ekskurso al SUVA

La ĉi-somera ekskurso de LES okazis la 10-an de aŭgusto. Per promenadeto laŭlonge de la lucerna lago ĝi kondukis la grupanojn al la impona konstruaĵo de la Svisa Akcidenta Asekurejo SUVA. Kaj tie en la eleganta kunvenejo de la administra konsilantaro de la entre-

preno Konrad Rey raportis pri la historio kaj pri la hodiaŭa graveco de tiu firmo, kiu fariĝis la plej granda ofertanto de la deviga akcidenta asekuro en Svislando. Ĝi entute asekuras preskaŭ la duonon de la laboristaro kontraŭ labor-akcidentoj, metimalsanoj kaj libertempaj akcidentoj. En la jaro 2004 ĝi zorgis pri 109'997 asekuritaj entreprenoj kaj pri 1 miliono okcentmil asekuritoj.

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil

www.esperanto.ch/wil

Kunprezidantoj: Verena Chaves-Walder, Rosenhügelstr. 22, 9230 Flawil. Tel.: 071 393 41 49. chaves-walder@bluewin.ch kaj Wolfram Fischer. Steigstrasse 12, 9116 Wolfertswil. Tel.: (P) 071.390.04.48 (O) 071.390.04.44. Fax: 071.390.04.47

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19 h 00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse 1 (apud la suda elirejo de la fervoja stacidomo).

Kunvenoj

Septembre 6: Kunveno.

Novembre 8 : Raporto pri la UK en Florenco kun Roberto kaj lingva ekzercado kun Wolfram.

Decembre 6 : Fonduo kun la familio Fischer kaj poemoj, rakontoj kaj kantoj.

-oOo-

Informilo pri la revuo

Monato

Profitu pri la oferto aldonita al nia bulteno por malkovri aŭ malkovrigi la variecon de la magazino **Monato**.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld.

Tel.: 044 251 50 25

info@esperanto.ch reto:

www.esperanto.ch/zuriko

Regula merkreda programo : krom dum la ferioj : 18.00–18.45 : kurso por komencantoj. 19.00–19.45 : konversacia rondo. (bonvolu telefone aliĝi dum la oficeja horaro ĝis la tago antaŭa : 044 251 50 25 aŭ retroŝte : info@esperanto.ch).

Kunvenoj

Septembre 15 : 20h00: Prelego de Dietrich Weidmann : propedeŭtika valoro de esperanto.

Septembre 20 : 18h00 : Komenciĝo de la esperanto-kurso por komencantoj. Kaj rekomenciĝo de la konversacivesperoj.

Oktobre 14 : Orientsvisa Esperanto-Kulturrenkontiĝo. Vidu paĝon 15-a.

15 : Familia migrado sur Pfannestil : Vidu paĝon 15-a.

Decembre 8 : Zamenhofa festo kun fonduo.

-oOo-

La venonta numero de nia
bulteno

SES informas

aperos komence de oktobro.

Nepre sendu viajn artikolojn kaj la anoncojn kaj la raportojn pri la aktiveco de via societo ĝis la 15-a de septembro.

Redaktas : Richard Schneller, Höhenstrasse 1 b, CH-9302 Kronbühl, rischneller@gmail.com
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Nekonata aspekto de Jules Verne

La centjariĝo de la morto de Jules Verne (1828-1905) estis markita per abundaj laboraĵoj kaj artikoloj pri la aŭtoro kaj lia verko. Ŝajne ĉio estis dirita pri la temo. Kion novan aŭ nepublikigitan oni povus malkovri ?

● André Panchaud [1]

Tamen estas neesplorita kampo, kiun neniu ekzegezisto de la Verna verko estimis rememore elvokinda. La aŭtoro de la « Eksterordinaraj vojaĝoj » (« Voyages extraordinaires ») ĉiam revis pri ideala socio konsistanta el respondecaj kaj prudentaj civitanoj kaj pri homaro pli klera kaj pli justa, memstare zorganta pri sia destino sen la helpo de iu dio aŭ providenca homo. Tia homaro – por povi vivi plej harmonie – devus posedi universalan rimedon de komunikado, komunan lingvon.

Jules Verne estis konvinkita ke konstruita lingvo universala povus esti vivipova. Li aludas pri tio en « Dudek mil leŭgoj sub la maroj » (Vingt mille lieues sous les mers). La skipo de « Nautilus » konsistis el homoj diversnaciaj : hispanoj, turkoj, araboj, hindoj, povantaj interkomunikiĝi sole per « idioma strangeta, unika kaj absolute nekomprenebla ». Temis pri lingvaĵo sciata nur de ili, pri lingvo inventita,

kiun ne sukcesis kompreni la « gastoj » enŝipigitaj kontraŭvole.

« Jen la malagrablaĵo ne scii ĉiujn lingvojn », rimarkigas rolulo de la romano, « aŭ la malavantaĝo ne havi ununuran lingvon. »

« Estis, skribis la aŭtoro, idioma sonora, harmonia, fleksebla, kies vokaloj ŝajnis submetitaj al akcentado tre varia. »

La mencio de ĉi tiu idioma ripetiĝas dekon da fojoj en la verko. Frapas en la teksto de Jules Verne la aludo al lingvo « sonora, harmonia, fleksebla », kiun ĉiu esperantisto povas trovi en multaj lernolibroj kaj tekstoj dediĉitaj al la Internacia Lingvo : « belsona, harmonia, fleksebla ». Konkludo : la ŝipistoj de la « Nautilus » esprimiĝas en esperanto.

Malfeliĉe ĉi tiu hipotezo kolizias kun grava kontraŭargumento. « Dudek mil leŭgoj sub la maroj » publikiĝis unuafoje en la « Magazino por eduko kaj distro » (« Magasin d'éducation et de récréation ») en 1869. Do dek-ok jarojn antaŭ la apero de la franca traduko de la broŝuro de Zamenhof titolita « Langue internationale du Docteur Esperanto » (1887). En 1869 Jules Verne do ne povis ekscii pri lingvo ne ankoraŭ ekzistanta. Ĉu povus temi pli ĝuste pri volapuko ? Ankaŭ ne. La unua lernolibro naskiĝis nur en 1880. Cetere la kvalifikoj de « sonora, har-

monia, fleksebla » ne konvenus al la nealloga kaj komplika lingvaĵo de la germana pastro Schleyer.

Ĉi tie manifestiĝas anakronismo, kiun oni tute logike povas atribui al posta rearanĝo de la originala teksto dum la reeldonoj.

Oni scias ke Jules Verne havis pasion por la Internacia Lingvo. Lia nevino, s-ino Allotte de la Fuÿe, atestas pri tio en sia korespondado: « Jules Verne estas partiano de esperanto. Li intencas dediĉi volumon al ĉi tiu temo kaj opinias ke la ŝlosilo de la homa lingvo perdita en la Babelturo devus esti forĝata artefare. »

En 1903 konstituiĝis esperantista grupo en la urbo Amiens kie loĝis la verkisto. Jules Verne aliĝis tuj. Tie li havis du amikojn: Charles Tassen-court, la prezidanto, kaj Joseph Delfour, famkonata esperantisto. Ambaŭ proponis la honoran prezidantecon al la romanverkisto, kion li akceptis favore. Ĉi-okaze li promesis verki romanon laŭdante la meritojn de esperanto.

Li tenis sian promeson. Tamen pro malsano, laciĝo, duona surdeco kaj blindeco li ne povis finprepari la verkon. Ĝis sia morto (24an de marto 1905) li estis skizinta nur la kvar unuajn ĉapitrojn. Estas interese atentigi pri kelkaj diraĵoj metitaj en la buŝon de persono de la rakonto.

« Unue oni devas konstati ke esperanto estas idiomo simpla, fleksebla, harmonia, kiu same taŭgas por eleganta prozo kiel por harmoniaj versoj. Ĝi kapablas esprimi ĉiajn pensojn kaj eĉ la sentojn la plej delikatajn de la animo. Cetere ĝi estas la tipo de internacia lingvo. La ĉefa ideo por ĝia formigo estas la elekto de la radikoj proporcie al

ilia internacieco, tio estas elektitaj laŭ la universala voĉdonado. »

Kaj la aŭtoro skribas ke « la studo de esperanto prezentas nenian malfacilon por la prononco aŭ por la memoro. Oni lernas ĝin kiel oni spiras... ».

« Ĉi tiu lasta verko, titolita « Studvojaĝo » (« Voyage d'étude ») [2], estas la lasta verko super kiu laboris mia patro », skribis lia filo Michel la 30an de aprilo 1905. Je la morto de la verkisto la kruda skizo konsistis el kvar ĉapitroj plus la komenco de la kvina. La rakonto temis pri aventuro de kolonia misio en Afriko. Unu de la temoj devis esti esperanto.

Michel Verne reprenis la manuskripton de sia patro por redakti « La miriga aventuro de la misio Barsac » (« L'étonnante aventure de la mission Barsac »). Li entreprenis veran fuŝon de la « Studvojaĝo » densigante la kvar unuajn ĉapitrojn en unu sola kaj ne respektante la lokon de la ago transplantante ĝin de la franca Kongolo al Gvineo. Aliflanke lia romano, kiu fine konsistis el 15 ĉapitroj, temas nur pri koloniismo forigante ĉiujn aludojn al esperanto. Ci tiun fakton Charles-Noël Martin eĉ ne estimis menciinda en la antaŭparolo de « La miriga aventuro de la misio Barsac ». [3]

Estis la destino de Jules Verne morti nur kvin monatojn antaŭ la unua tutmonda esperantokongreso organizita en Bulonjo-ĉe-Marco de la 5a ĝis la 13a de aŭgusto 1905. La celebrado de la centjariĝo de tiu evento evidentigis la mirindan vivoforton de ĉi tiu lingvo, kiun la aŭtoro de la « Eksterordinaraj vojaĝoj » konsideris « la plej sekura, la plej rapida vehiklo de la civilizacio ».

La retaliro fine ebligas dokumentiĝi pri lingvo vere vivanta, kiun ĝis nun konspira silento senekvivalenta en la historio provis sufoki.

Antaŭsentinte la belan estonton promesitan al esperanto, sola lingvo vere universala, Jules Verne vidis ĝuste.

[1] Aperis en la franclingva « Trait d'Union », n-ro 166, dec. 2005, p. 19-21 (www.arci.ch/tdu166). Tradukis Richard Schneller.

[2] Publikiĝis en « Bulletin de la Société Jules Verne », n-ro 98, dua trimestro 1991.

[3] Editions Rencontre, Lausanne, 1971.

La oldulo kaj l' amaro

Fasketo da pensoj ĉirkaŭ la morto de Fernando de Diego

• *Gonçalo Neves*

Fernando de Diego de la Rosa, fekunda tradukisto, recenzisto, kritikisto, eseisto kaj publicisto, klera homo, polemika figuro, adorata de iuj, anatemata de aliaj, enviata de pluraj kaj ignorata de multaj – mortis. Li planis « atendi la alvenon de la aĝa frato de la Songô » en Wrocław, sed la granda Falĉisto preferis lin viziti hejmlande, kien li revenis amare kaj solece post la forpaso de Czesia, la pola edzino. Li oldis 85 jarojn, sed lia menso lucidis ĝis la fina rajpo de la motoro korpa.

Malfacilas objektivi pri homoj, eĉ se kadavraj, skeletaj aŭ jam polvaj. Eĉ pli dorna la tasko kiam oni la juĝaton konis persone. Nun mi ĝojas ke Fernandon mi neniam renkontis, ke lian voĉon mi neniam aŭdis, ke nenium leteron aŭ bileton mi interŝanĝis kun li. Eble tial mi nun kapablos iom proksimeti al dezirata subjektivo.

Lin mi lernis rendevui sine de streĉa silento, kiun interrompis nur la paĝa susuro de mia leg-avido. Frazon post frazo, vorton post vorto, mi po- iome mergiĝis en fabelan mondon, kies

solaj loĝantoj estis puraj tintoj kaj ŝvebaj pepoj. Tiun mondon eblas nomi stilo. Jes, antaŭ kaj super ĉio Diego rangis kiel stilisto. Lian orelon agacis ne nur ĉio kakofonia, sed ankaŭ ĉio gurda, teda, monotona kaj plata. Por dishaki sintaksajn veprojn li tratalpis nian klasikan grundon kaj esploris ties plej profunde kaŝitajn ercojn. Ekzemple, dum aliaj proponis kaj ekuzis ekstravagancajn rimedojn por dampi la grincon de nia fifama paro *tiuj kiuj* (ĉi- strebe Lanti lanĉis – sed poste repudiis – la formon *ti-kiuj*), Diego preferis resti cise kaj ĉerpi el la interna bunto de la lingvo. Tion ekzemplu jena eltiraĵo el Donkiĥoto (ĉap. XIII, p. 95):

La rigardantoj, la fosantoj de la tombo kaj la ceteraj homoj gardis impresan silenton, ĝis unu el la kadavro-portintoj diris al alia [...] [1]

Oni rajtas objeti ke ĉi-terene liaj solvoj ŝajnas kolumb-ovaj, ke iu ajn meztalenta kapablus ilin elpensi kaj senĝene apliki. Prava objeto. Tamen endas riposte demandi : kial tiajn ovojn ne starigas pli da Kolumboj, kial post pli ol cent jaroj nia prozo ankoraŭ trenpaŝas ĉe multaj aŭtoroj, kial ankoraŭ knaras tiom da plumoj, eĉ renomaj?

Gonçalo Neves, *1964, portugalo, licenciito pri plantpatologio. Lernis Esperanton en 1987. Aktivis en la Portugalia Esperantomovado inter 1987 kaj 1993. Ekverkis en 1989. Akademiano 1995-1998. Premiĝis en la Internaciaj Floraj Ludoj kaj en la Belartaj Konkursoj de UEA. Aperigis poemojn, novelojn, eseojn en pluraj gazetoj. Prelegis pri literaturaj temoj. Kune kun Miguel Fernández, Jorge Camacho kaj Liven Dek formis « Iberan grupon » en la Esperanta literaturo. Verkoj: *Ibere libere* (kun la Ibera grupo, poemoj 1993), *Kompreni* (noveloj 1993), *Ekstretoj* (kun la Ibera grupo, noveloj 1997), *Simptomoj* (poemoj 2000).

Ĉiaokaze, ĉi faceton de Diego oni ordinare ignoras aŭ prisilentas.

Kiam temis pri tratanĉo de gordiaj nodoj leksikaj, Diego plukis el pluraj arboj. Li ne nur insiste kaj persiste uzis vortojn neofte renkontatajn en la demotika* esperanto, abunde ĉerpante el Kalocsay, Waringhien kaj aliaj korifeoj, sed eĉ lanĉis kelkajn novaĵojn el sia propra ateliero. Ekzemple, en liaj lastaj tradukoj aperas *mokra*, tre bela kaj elvokiva vorto, samsignifa kiel la demotika *malseka*. Tiun vorton, el la pola *mokry* kaj identa kun la rusa мокрый, inspiris al li la edzino. Ĉi faceton de Diego oni supraĵe komentas en kulisoj kaj laŭte distrumpetas en agoroj. El tia pritrakto rezultas la famo de Diego kiel neologo, dum lia enverguro kiel stilisto iel postrestas duarange.

Oni emas preterrigardi ankaŭ aliajn faktojn pri Diego. Ĉu niaj oficialaj kaj duonoficialaj opiniistoj scias ke Diego produktis la impresan kvanton da 3560 tradukpaĝoj? Ĉu ili konscias ke tiu

paĝ-amaso rezultis el laboro intensa, streĉa, rigora, esplora? Ke li ĉion trameditis, reviziis, kribris, poluris kaj emajlis ĝis la lasta imagebla detalo? Ke li komparis siajn tekstojn kun alilingvaj tradukoj? Ĉu tiaj opiniistoj scias ke li estis ankaŭ senlaca leganto kaj vastpaletra analizanto de nia literaturo? Ke li recenzis ne malpli ol 217 verkojn?

Diego ja konis ĉiujn fibrojn kaj neŭronojn de esperanto. Nenio ĉe li rezultas el kaprico, frivolo aŭ hazardo. Evidente li ne ĉiam trafis. Tamen liaj solvoj neniam ŝajnas ekstravagancaj, idiolektaj** aŭ ŝiboletaj. El ĉio lia-pluma emanis seriozo, kompetento kaj talento, eĉ se oni ne konsentas pri tiu aŭ alia vorto, pri tiu aŭ alia tropo.

La oldulo sinkis amare. La skipa reviziado de lia giganta vortaro hispana-esperanta (1279-paĝa) treniĝis dum jaregoj kaj kaŭzis al li ne pokan angoron. Kiam fine ĝi eldoniĝis en 2003, li jam komencis sobgliti la vivtaluson. Sed lian amaron nutris ankaŭ la maljusta bildo kiu restis post iom da kuraĝaj elpaŝoj liaflankaj, nome kiam li aŭdacis publike kritiki mistalentajn verkojn de Auld, Piron kaj aliaj popularaj figuroj de la verda panteono. Kiam oni tanĝas guruon, oni riskas batuon. Plurspecaj katapultoj priĵetis Fernandon dum lia longa kariero kiel esperanta tradukisto. Eĉ ŝovinisman riproĉon de Ungar li devis elteni, kiam li, hispano, aŭdacis esperantigi verkon de angla aŭtoro!

Diego, profunda konanto de nia lingvo kaj literaturo, ŝajne ne tiom detale familiariĝis kun nia historio. Eble tial li ne memoris ke Cart, nia unua demotika demagogo, publike skurĝis Zamenhof pro ekuzo de *heziti* anstataŭ *ŝanceliĝi*, dum li mem en siaj

artikoloj uzis vortojn kiel *skvaro*... Ke la metodon de Cart imitis multaj, avidaj rapide populariĝi kaj gvidi amasojn. Ke ĝin imitas eĉ hodiaŭ pluraj podiuloj de nia verda mondeto. La recepto estas facila. Sufiĉas pilorii neologojn por akiri pli da voĉoj kaj sorigi sian kvoton de populareco. Ankaŭ Akademien tio helpas... Dum pluraj jaroj Diego disponeblis kiel taŭga furaĝo por tiaj soruloj. Nun lia korpo kadavras. Kiel elektebla celtabulo ankoraŭ restas Hauptenthal. Ankoraŭ eblas sterki la fantasmojn de la reformemo, kies kontraŭbatalo pravigas la promocion de ĉiaspecaj nuloj...

Por aliaj, espereble ĉiam pli multaj, restas la verkaro de Fernando de Diego. En ĝi la zamenhofa lingvo vikle pulsas kaj delekte scintilas. Eble iam oni povos starigi veran tradukistan lernejon, kie oni studos kaj analizos la solvojn de Diego kaj aliaj eminentaj aŭtoroj. Eble tiam la proporcio de lerte kaj bele tradukitaj verkoj komencos pli rapide kreski kaj eĉ superos tiun de tekstoj plataj kaj sensalaj, eĉ se gramatike korektaj. Eble tiam esperanto imponos kaj impresos: ne kiel «tutmonda dua lingvo» – tia ŝanĉo egalas nulon – sed almenaŭ kiel prestiĝa kaj respektata idiomato literatura, kiun multaj kulturhomoj scipovos, eĉ se nur pasive, por koniĝi kun la bonaj verkoj tradukitaj en ĝi kaj kun la bonaj originaloj karambole rezultintaj el tia tradukstrebado.

Ĉiaokaze la verkaro de la oldulo ekspluateblas jam nun. 3560 paĝoj da klara kaj elasta stilo sin proponas kiel fonto de plezuro kaj lerno. En la nuna jaro, kiam oni festas la 400-jaran datrevenon de Donkiĥoto, oni komencu ekzemple per tiu 820-paĝa verkego. Oni ne nur paradu per ĝi en publikaj

ceremonioj por impresi skabenojn kaj ĵurnalistojn. Oni ja apertu la pezan volumon en la silento de sia alkovo kaj legu el ĝi, en verva esperanto, la instruajn aventurojn de la plej fama vaganta kavaliro. Kaj legante oni lernu verki pli bone kaj paroli pli bone. La belo bele. Dankon, Fernando.

(*Represita el Fonto, n-ro 295, p. 3-7.*)

* *demotika* : popola, komunuza (lingvo, skribo)

** *idiolekto* : lingvouzo de difinita individuo (lingvosciencoj)

[1] En la hispana originalo ĝi tekstas: «Y así los que esto miraban, como los que abrían la sepultura, y todos los demás que allí había, guardaban un maravilloso silencio, hasta que uno de los que al muerto trujeron dijo a otro [...]». Jen laŭvorta traduko: «**Tiuj, kiuj** ĉi tion rigardis, same kiel **tiuj, kiuj** fosis la tombon, kaj la ceteraj homoj, **kiuj** estis tie, gardis impresan silenton, ĝis unu el **tiuj, kiuj** estis portintaj la kadavron, diris al alia [...]»

En hor' krepuska...

En hor' krepuska estis, ke al mi la mort'

El fundo de mia spegulo montris sin, junul', al mi simila en vizaĝ' kaj kresk'.

« Mi vin ne timas, granda ombro », diris mi.

« Tro frue vi kun vi ja konatigis min. Vi al mi ne terure proksimiĝos nek distordos la vizaĝon, kies klara frunt' surhavas mildan brilon de memkontentiĝ'.

Vi iam al mi venos frat', ne malamik'. »

Christian Morgenstern

El la ĵus aperinta libro « Elektitaj poemoj kaj aforismoj », Postrikolto al : Kaj rerondiĝas florokrono. El la germana tradukis Willy Nüesch, Berno 2006.

Renaskigi esperon en Balkanio

• *Henri Masson*

La okazigo, du jarojn sinsekve en Balkanio, de kongresoj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), en Zagrebo en 2005, en Beogrado en 2006, rememorigas tragedion flankenmetita el la aktualaĵoj. En 1991, la Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (ELBIH) invitis SAT okazigi sian kongreson de 1993 en Sarajevo. Unu jaron poste, sur la kovrilpaĝo de « Sennaciulo », la organo de SAT, troviĝis alvoko de la ELBIH en kiu la esperantistoj estis invititaj agi por ĉesigi la militon kaj la kontraŭpopolajn perfortaĵojn. Socikultura asocio, SAT jam havis kongresojn en Beogrado (1956), Novi Sad (1969) kaj Rijeka (1980), kaj tiu ĉi povintus esti alia rimedo por pli bone disvastigi tiun mesaĝon tra la mondo. Precize en Sarajevo mem, per grandaj manifestacioj, la loĝantaro forĵetis kaj kondamnis plej energie la instigon al interetna malamo. Publikigitaj en « Sennaciulo », informoj de membroj de SAT en la landoj de eks-Jugoslavio jam havigis klarigojn pri la minacoj, kiujn estigis naciismo kaj etnismo en eksceso en Balkanio.

Infanoj kaj patrinoj

En oktobro 1991, okaze de la Internacia Infan-semajno, lernantoj de Zagrebo sendis alvokon al la plenkreskuloj kun peto apliki la « Deklaracion de la Infanaj Rajtoj ». Ilia mesaĝo havis jenan konkludon : « La ideo de Esperanto instruas al ni ke ni devas esperi. Tial ni, la plej junaj infanoj de Zagrebo, esperas ke la saĝo venkos kaj ke ni vivos kiel granda familio : la

mondo de Paco. » Cetere, artikolo titolita « Patrinoj kaj milito » (decembro 1991) menciis rezistadon de patrinoj de Balkanio. Respondo de patrino al la aŭtoritatoj : « Kie estas la eksteraj malamikoj ? Ni ne havas agresantojn, ni havas banditojn. Ni ne permesas ke vi manipulu niajn infanojn ! La patrinoj de tuta Serbio postulas ke vi tuj resendu niajn infanojn. » – « Sennaciulo » de majo 1993 enhavis longan artikolon pri Sarajevo kun subskribo de Senad Ĉoliĉ, esperantista loĝanto : « ... Efektive, oficejo de la E-Ligo de BkH kaj ĝiaj materiaj kaj homaj potencialoj estis dum kvin, ege malfacilaj kaj gravaj monatoj, en funkcio de batalo por homeco, centro de intelekta rezisto sur plano de homaj rajtoj orientita al la gvidaj interŝtataj institucioj kaj la monda publiko, la centro kiun vizitadis dekoj da kunlaborantoj, publikagantoj kaj ĵurnalistoj. » Bedaŭrinde, pereis esperantistoj. La lokaloj estis plejparte detruitaj kun ilia enhavo. Dum la sieĝo, en 1994-1995, Radio Sarajevo uzis ankaŭ Esperanton por diskonigi informojn kiuj poste aperis en la libro « Spite al ĉio Bosnio » eldonita en Sarajevo fare de ELBIH kun subteno de Kataluna Esperanto-Asocio. Malgraŭ la ekstreme malfacilaj cirkonstancoj, la esperantistoj daŭrigis la agadon same en Serbio kiel en Kroatio, en Slovenio, en Bosnio kaj Hercegovino kaj en Albanio per partopreno en pedagogiaj agadoj (projekto de interkultura agado « Interkulturo »), al la redaktado kaj eldono de studverkoj, de vortaroj, de literaturaj verkoj. Bloki la militmaŝinon de individuo kiu havis por principo sisteme

perfidi siajn engaĝigojn ne povis okazi sen damaĝoj. La serba popolo estas finfine liberigita de la plej granda plago de sia historio. Tereza Kapista, mem-

bro de la organiza komitato de la ĉijara SAT-kongreso en Beogrado, instruis Esperanton en tendaroj de afganaj rifuĝintoj kaj, pli freŝdate, en Burundio.

« Svislando estas kvarlingva, la svisoj ne... »

La diskuto prilingva en Svisio denove aktualiĝas pro la decido de la federacia registaro atingi kelkajn unuecajn bazojn tutlandajn rilate la instruon de lingvoj, pri kiuj ĝis nun decidis la 26 kantonoj memstare kaj havis malsamajn sistemojn. En la romanda televido okazis interesa debato pri ĉi tiu temo (Do you speak Swiss? – <http://infrarouge.tsr.ch/>).

• Richard Schneller

Inter aliaj partoprenis ĝin Beat Kappeler, iama profesoro pri socipolitiko en Laŭzano kaj ekonomika ĵurnalisto. Kvankam ŝatanto de la franca kaj bone scianta ĝin, li trovas ke la graveco de ĉi tiu lingvo en internaciaj rilatoj cedis la lokon al la angla. Ĝis nun en la lernejo oni instruis ĝenerale la francan aŭ la germanan kiel duan lingvon. Laŭ li tiu sistemo fiaskis en Svisio. Hodiaŭ la junaj romandoj ne ŝatas lerni la germanan kaj svisgermanoj reciproke ne la francan. Ĉiukaze la komunikado inter ĉi tiuj du lingvokomunumoj ne kontentige funkcias. Li pledas por unueca lernado de la angla ĉar la monda ekonomio, tekniko, turismo ktp. necesigas la scion de la angla. Cetere la junuloj pli ŝatas la anglan-amerikan kulturon kaj muzikon.

Isabelle Chassot, la ĉefino de la instrudepartemento en la kanton Friburgo – kiu ne kontestas la utilon de la

angla, sed preferas lernadon de dua svisa lingvo prioritare kaj nur poste de la angla – kompreneble ne povas konsenti kun la vidpunkto de Kappeler kaj emfazas la utilon de plurlingvismo en dulingva (franca/germana) kanton. Dua svisa lingvo ankaŭ ebligas konatiĝon kun alia kulturo. Ne nur gravas la ekonomiaj avantaĝoj por personoj laborantaj en multnaciaj firmaoj ĉe kiuj la angla estas preferata komunikilo. Cetere studo montris ke la mezgrandaj entreprenoj en Svisio uzas la du ĉefajn lingvojn de Svisio pli ofte ol la anglan.

Ekzistas kompreneble plibonigebloj en la publika instruado de lingvoj per pli frua lernado de dua lingvo jam en la unuagradaj lernejoj. Junaj infanoj ne havas antaŭjuĝojn por lerni fremdajn lingvojn dum adoleskantoj estas pli rezervitaj. Ĝis nun oni instruis fremdajn lingvojn nur en la duagradaj lernejoj. La problemo de frua lernado estas ankaŭ problemo de adaptiĝo por la instruistoj en la unuagradaj lernejoj, kiuj devus ricevi pli adekvatan trejnadon en la pedagogiaj altlernejoj.

François Grin, vicdirektoro de la publika instruado en Ĝenevo kaj ekonomikisto, atentigas pri la nejusteco de lingva hegemonio kaj defendas siajn esplorojn pri la ekonomiaj avantaĝoj kalkuleblaj en miliardoj da eŭroj por Usono kaj Britio pro la instruado de la angla ĉie en la mondo kaj la avantaĝoj

de denaskaj anglalingvanoj. Al tio Kappeler respondas ke li aprobas kaj dankas la menciitajn grandpotencojn por la investo de mono cele al la instruado de la angla : « Tio estas utila por ĉiuj popoloj en la tuta mondo ! »

Kiam oni demandas lin, ĉu la svisa parlamento uzu la anglan, eĉ li allasas ke tio ne eblas pro la longa tradicio kaj neskribita leĝo ke parlamentano esprimas sin ĝenerale en sia gepatra lingvo, plej ofte en la franca aŭ la germana, kaj nepre devas almenaŭ kompreni la alian lingvon.

Christine Lepape Racine, specialistino pri la instruado de lingvoj rimarkigas ke oni mensogas al la infanoj kiam oni diras ke la angla estas facila lingvo.

Tio veras por la komenco kompare kun la franca kaj la germana, sed la diferenco malpliigas dum la plua studado.

Interpretistino konstatas ke fakuloj utiligantaj la anglan povas diskuti sur alta nivelo en siaj respektivaj fakoj, sed kiam temas pri aferoj ne koncernantaj siajn fakojn ilia nivelo estas nesufiĉa.

Esperanton oni menciis nur unufoje en negativa komparo parolante pri la fuŝa angla (globish), « kiu estas ia primitiva esperanto ». Bedaŭrinde oni nenion diris pri esperanto mem, kiu povus esti almenaŭ parte solvo de la lingva problemo kaj cetere doni bonan bazon por la lernado de fremdlingvoj, se ĝi estus instruata en la unuagrada lernejo kiel dua lingvo post la gepatra.

« Gerda malaperis ! », la filmo

- *Karen Pereira, Joe Bazilio*

Finfine estas preta la tiom atendata filmo « Gerda malaperis ! » Ĝi estas frukto de longa laboro kiun ni ekis en la pasinta jaro kaj ĵus nun ni finigas. Ĉi filmo estas speciale por la esperantistoj tutmonde. Nia skipo estas geesperantistoj kiuj kredis ke tiu filmo estas grava ne nur por la lernantoj sed ankaŭ por ĉiuj ni, ĉar ĝi ekas novan eraon pri komunikado en esperantujo.

Ĉi jaro ni fondis la filman entreprenon « Filmoj Imagu » kies celo estas produkti bonajn filmojn tute en esperanto, ĉar mankas tiaj en nia medio. La filmo « Gerda malaperis ! » ni pene realigis proprapoŝe kaj kun gravega helpo de kelkaj afablaj esperantistoj kiuj apogis morale kaj finance nian projekton. Pro tio ni invitas vin esti partoprenanto en tiu gravega laboro. Ni

instigas vin antaŭaĉeti almenaŭ unu ekzempleron de nia filmo. Ĝi estas finpretigita en la formato DVD (libera regiono).

Via aĉeto helpas nin prepari aliajn filmojn. Aliajn formojn kunhelpi ni proponas : disvastigi ĝin en viaj diskutlistoj, en viaj blogoj, en orkuto, per retmesaĝoj, en via klubo, en via esperanta gazeto, revuo, kaj kompreneble « buŝ' al buŝo », kiel kutime diras la brazilanoj. Nia skype-adreso : amiko4321. Kontakto nin !

Ni antaŭdankas vian atenton kaj komprenon kaj esperas ke vi ĝuu nian filmon speciale preparitan por vi. Por plej bone koni nian laboron vizitu : www.imagufilmo.org. Bonvolu komenti, sugesti, kritiki kaj sendi al ni mesaĝon por ke ni sciu pri via opinio.

(Peris : Benno Frauchiger)